


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

EN PURSUOMA ¹⁾ SVITBANEJO.

Unu el la plej interesaj kaj mirigaj vidindaĵoj por eksterlandano en nia lando certe estas suoma ŝvitbanejo. Mi estas amiko de tia banejo kaj tial deziras klarigi ĝin al miaj eksterlandaj ĝeamikoj.

Pursuoma ŝvitbanejo estas malgranda, ligna konstruaĵo, kiun ni konstruas — se eble — sur la bordo de lago aŭ rivero.

Sed ni rigardu ankaŭ la internon. Unue vi, eksterlandano, miros pri la nigraj muroj. Nu, vi tuj komprenos tion, ĉar en la ŝvitbanejoj ne estas kamentubo kaj la fumo nigrigas la murojn.

En unu angulo estas ŝtona fajrejo farita el ŝtonoj sen cemento. En alia angulo staras baneja bretaro, sur kiu ni sidas dum la banado. Ĝi estas tiel alta, ke nia kapo ne tuŝas la plafonon.

En unu muro estas malgranda truo por tralasi la fumon. Ankaŭ malgranda fenestro estas en unu muro. Kaj mallonga benko staras en la ŝvitbanejo.

Certe ankaŭ vi deziras bani vin, ĉu ne?

Nu, ni hejtu la ŝtonan fajrejon. Vintre ni komencas hejti ĝin du, tri horojn antaŭ ol ni deziras bani nin, somere unu, du horojn. La plej bonan vaporvarmegon oni ricevas, se oni hejtas ĝin per betula ligno. Ni finas la hejtadon, kiam la ŝtona fajrejo siblas,

¹⁾ Suoma = Finnlanda.

se ni verŝas iom da akvo sur ĝin. Sed ni zorge observu, ke ne restu brulrestaĵoj, ĉar tiam ni ekhavirus kapdoloron dum la banado.

Kiam la ligno estas tute forbrulinta, ni fermu la truon en la muro. En tinoj ni portas malvarman kaj varmegan akvon al la baneja bretaro.

Fine ni komencu la banadon.

Ĉi tie, en la kantono Karelujo, venas virinoj kaj viroj aparte, do ne kiel en kelkaj regionoj de nia lando.

Ni eniras la banejon kun puraj subvestoj, folikvastoj kaj sapo sub la brako. Sed vi, eksterlandano, eniras tien kiel al dentisto, do iom time.

Sur la benkon ni metu niajn vestojn kaj grimpu sur la banejan bretaron. Ho-ho, mia amiko, bone atentu, por ke vi ne eksidu sur la kapetoj de la najloj, per kiuj la baneja bretaro estas alnajlita. La kapetoj ja estas varmegaj.

Unu el ni ĵetas iom da akvo (varmegan aŭ malvarman) sur la ŝtonan fajrejon. Ĝi (la akvo) tuj vaporigaĝas. Se ni ne deziras tuj salti suben de la bretaro, ni ne ĵetu tro da akvo. Tuj ni ŝvitas kaj ni komencas uzi la folikvaston.

Folikvastojn ni suomoj faras el branĉetoj de betuloj. Somere ni faras ilin ankaŭ por la vintro. Per folikvasto la malpuraĵoj liberiĝas pli bone ol nur per akvo kaj sapo.

Post la banado ni lavas nin per akvo kaj sapo. Post tio ni jam estas puraj, sed ni certe naĝas, se la banejo staras sur la bordo de lago. Naĝado ja multe vigligas nin.

Baldaŭ ni estas pretaj kaj surmetas la purajn vestojn sur la puran haŭton.

Mi kuraĝas opinii, ke ankaŭ vi estos amiko de la suoma ŝvitbanejo post la unua banado.

Mi memoras tre amuzan okazon, kiam kelkaj eksterlandanoj banis sin antaŭ kelkaj jaroj. Ili nur aŭdis, kiel ni faras tion, sed ne vidis ĝin. Tamen ili kuraĝe deziris bani sin.

Nu, ni, suomoj, multe hejtis la ŝtonan fajrejon. Ankaŭ varmegan kaj malvarman akvon ni alportis, donis al ili folikvastojn, do ĉion, kion ili deziris.

Ili demetis la vestojn kaj grimpis sur la bretaron. Unu el ili ĵetis akvon (varmegan!) sur la ŝtonan fajrejon. Eble ili ĵetis tro multe, ĉar en la banejo estis multe da varmega vaporo. Tiam unu el ili time ekkris: „Ĉi-ĉi-tie ni baldaŭ brul-bruletiĝos!”

Alia diris: „Ĵetu akvon malvarman sur la fajrejon, tiam ĝi tuj malvarmiĝos!!”

Iu ĵetis malvarman akvon, sed — des pli da varmega vaporo.

Subite ĉiuj transkapiĝis eksteren, sen vestoj, kiel Adamoj en la paradizo kaj ni, suomoj, ridis. Ili ne komprenis, ke ankaŭ la malvarma akvo kaŭzas vaporon.

Mi esperas, ke laŭeble multaj esperantistaj gejunuloj vizitos nian landon dum la olimpiado en Helsinki en 1952 kaj ke ili tiam ankaŭ banos sin en pursuoma, malnova ŝvitbanejo!

Bonvenon en Suomujo kaj — bonan vaporvarmegon!

Martti Turpeinen (17-j.) Sivakkajoki, Valtimo, Finnlando.

PLANICA, la mondkonata sportloko.

Se vi rigardas la geografian karton de Jugoslavujo, vi rigardu al la plej nord-okcidenta parto. Tie vi trovos lokon, kie vintre estas tre vigle. Ĝi estas vere unu el la plej belaj montregionoj kaj konata pro la skisaltejoj, el kiuj unu estas la dua plej granda en la mondo.

Ĝi estas konstruita de inĝeniero Stanko Blondek en la jaro 1934-a kaj estis tiam la plej granda en la mondo.

En la jaro 1948-a la Sviso Tschannen atingis la plej longan salton: 120 metrojn. En la jaro 1949-a la Svedo Karlson estis la plej bona.

En la nuna jaro, okaze de la „Planica semajno” venkis Bradl Sepp, aŭstro. Li atingis la longecon de 79 metroj, ĉar oni saltis nur sur malgranda saltejo (80-metra), ĉar la grandan oni riparas kaj pligrandigas.

Nun ĉiujare okazas skisaltkonkursoj, al kiuj venas amasoj da homoj el Jugoslavujo kaj aliaj landoj, per ekstraj trajnoj, kiuj estas tutplenaj.

En Planica vi trovas ankaŭ glitejon, eble la plej bonan en Slovenujo, kie praktikas niaj plej bonaj geglitantoj: Marko Lajević kaj Silva Palma, tre popularaj sportistoj.

En la proksimeco de la sportejoj estas kelkaj belaj hoteloj, kie oni povas ripozi post laciĝo.

Tiel mi klopodis doni al ĉiuj legantoj rigardeton je Planica. Pliajn informojn vi ricevos, se vi skribas al la adreso:

Bozic Ivan, Kranj, Gasilski trg. 1, Jugoslavujo.

JUNULOJ ANTAŬ LA VIVO.

(Citajoj el aliaj leteroj, responde al la artikolo en la februara n-ro).

..... Se la vivo preterpasus, kiel L. B. priskribas, ĝi estus enuiga kaj tedega. La infanoj kaj gejunuloj, la uloj kaj ulinoj, ofte havas grandajn planojn por kaj sonĝojn pri la estonteco. Kaj mi

diras: Feliĉe! Se ili ne havus tiujn, ja ne plu venus iniciativo.

Jes, la vivo ofte postulas multe de tiu, kiu havas celon. Sed ĉu ne estas sporto, batali por tiu celo? — Alia afero estas, ke la vivo absolute ne estas nur laboro, manĝado kaj dormado. Ekzistas ankaŭ spirita vivo, kiu fakte estas same grava kiel la materia. Tio estas, ke oni devas plilarĝigi ankaŭ sian spiritan horizonton, ekzemple per legado, ne nur de distraj romanoj, sed ankaŭ de la monda literaturo

..... Iu famulo, mi ne memoras kiu, iam diris: „La vivo ne ĉiam estas balo, ĝi estas ankaŭ batalo kaj laboro!”

Sinjoro Ballesteros, mi ne estas certa, ke estas la vivmaniero en Hispanujo, kiu estas malbona. Ĉu ne eble, ke via propra vivkoncepto estas erara?

Kun amika saluto de dana junulo.

..... Finfine unu rimarko: Mi bedaŭregas, ke ekzistas la esprimo „kapti viron”, sed ke la sukceso tiurilate kreskas kun la inteligenteco de knabino tutcerte ne estas vere!! Kontraŭe: tre inteligenta knabino pensas memstare kaj pro tio kelkfoje maleblas al ŝi subiĝi (spirite) al viro. Due, pro siaj eventualaj kapabloj ŝi eble ankaŭ pli hezitas en la elekto de sia edzo. Verŝajne ŝi ne prenos la unuan plej bonan! — Jen mi devas fini, kvankam la problemoj ŝajnas tre interesa, ĉu ne?

Hildegund Feick, 76 Vaughan Rd., Harrow, Mdx., Anglujo.

Esperanto estas grava, ankaŭ por samlingvanoj.

Dum la Esperanto-kongreso en Mainz (Germanujo) je Pentekosto en la jaro 1950-a, mi i.a. vizitis ankaŭ la fakan kunsidon de la instruistoj.

Ĉe la komenco la referanto jam diris, ke li parolos germane, ĉar li ne sufiĉe povas paroli esperantlingve.

Poste kelkaj samideanoj parolis kaj ankaŭ mi. Kaj ĉar ĉiuj parolis germane, ankaŭ mi tion faris.


La germana lingvo havas multajn dialektojn kaj precipe nia bavara dialekto estas malfacile komprenebla por nordgermanoj. Tial mi penadis paroli pure germane.

Post iom da tempo mi denove ekstaris por paroli, sed la ĉeestantoj tuj interrompis min kaj petis min paroli Esperanton, ĉar ili ne komprenas mian germanan lingvon.

Granda estis la aplaŭdo. Kaj pruvo, ke eĉ samlingvanoj devas lerni kaj paroli Esperanton.

G. Stumpfegger, Freilassing, Germanujo.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned.
 Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).



Ĉisube ni publikigas la raporton de k-o Pfütze el Germanujo pri la **testado de gelernantoj por eniri la duagradan lernejon**. Ni, bedaŭrinde, ne povas presigi la detalan klarigon, sed ni opinias, ke ĉi tiu detalajo montras la gravecon de nia lingvo en oficiala eksperimento, kiu okazis je pasko 1950-a.

P. K.

La Kulturministerio de Schleswig-Holstein dekretis por la elekto de infanoj, transirontaj el elementaj lernejoj al pli altaj lernejoj, novan procedon. Por eviti la mankojn de la ĝisnunaj ekzamenoj, la necertecon pri ĝusta prijuĝo, la nervozecon de la infanoj k.t.p. oni kunigis la koncernajn 12-jarajn infanojn post 6-jara lernado en la elementa lernejo antaŭ Pasko dum du semajnoj en specialaj klasoj. La infanoj venis do ankaŭ el vilaĝoj kaj vilaĝetoj kaj kunsidis kun la urbaj infanoj. La gepatroj havis la eblon anonci siajn infanojn aŭ por la *Mittelschule* (mezgrada lernejo preparanta por teknikaj profesioj kaj praktikaj ĝenerale) aŭ por la „*Oberschule*” (supera lernejo, preparanta por la universitato).

Ni havis la taskon instrui tutlibere kiel ĉe la kutima instruado. La fakoj estis germana lingvo, historio, geografio, kalkulado, angla lingvo, alia lingvo (pri tio sube) kaj komplementaj fakoj kiel kantado.

Ne ekzistis dekreto pri la instruota materio aŭ fakkuniĝo. Do estis eble instruadi laŭ ĉiuj metodoj aŭ en unu fako aŭ kunigitaj fakoj.

La ĉiutaga instruado havis 4 lecionojn. En ĉiu semajno instruado de lundo ĝis vendredo. Estis entute 40 lecionoj. Sabate estis sufiĉe da tempo por konferencoj.

Post ok tagoj ni jam konis la plej multajn geknabojn, sed ni dubis ankoraŭ ĉe kelkaj je taŭgeco. Tio foriĝis post kelkaj tagoj de la dua elekta semajno.

La elementaj instruistoj de la infanoj devis prijuĝi la koncernajn infanojn de siaj klasoj. Sed la prijuĝskribajoj estis konataj nur al la estro de la elekta komisiono. Nur dum finkunsido de la komisiono ni devis kompari nian juĝon akiritan en la elekto kun tiu de la instruisto en la elementa lernejo. La gradoj de la prijuĝo estis:

A = taŭga

B = kondiĉe taŭga

C = ne kapabla

Ni konstatis en multaj kazoj, ke la prijuĝoj de elementlernejaj ĝeinstruistoj (precipe instruistinoj) estis tro bonaj. En dubaj kazoj ni alvokis la elementlernejan instruiston al la komisiona kunsido kaj decidis laŭ ties konsilo.

La dekreto enhavas nun la interesan punkton, ke la infanoj estu alparolataj helpe de lingvo, kiun ili ne konas. Kompreneble la komisiono enmetis la anglan lingvon en la planon de la du semajnoj, sed oni ne povis doni gravan akcenton al tiurilataj spertoj, ĉar la infanoj venis el tre multaj grandaj kaj eĉ malgrandaj lernejoj elementaj, kie ili laŭ la lokaj cirkonstancoj estis instruitaj en la angla lingvo plej diverse. Krome oni scias, ke la lernado de la angla lingvo ne havas tre grandan formalan edukvaloron, kiel ekzemple la latina lingvo.

En multaj komisionoj estis tre malfacile trovi kompetentulon, kiu sciis instrui

la grupojn en latina, dana aŭ franca lingvo. Mi petis la permeson por la apliko de Esperanto kaj ricevis ĝin de la distrikta lerneja inspektoro.

Estis tio la unua provo por mi tiamaniere konstati ĉe infanoj la kapablecon lerni fremdajn lingvojn. Estis mia tasko do doni al la infanoj dum malmultaj lecionoj laŭ la plej natura instrumetodo kiel eble plej multajn okazojn por lingva pensado. Mi ne dubis, ke Esperanto faciligos tiun taskon pro sia malhavo de esceptoj, pro sia facila ortografio kaj facila prononco. Mi do intencis pritrakti kelkajn simplajn temojn el la geografio kaj etnologio, **instigante la infanojn trovi mem la lingvajn leĝojn de Esperanto.**

Je la komenco de la elekto mi kunigis la infanojn de la du grupoj en mia mezgrada lernejo kaj faris antaŭ ili lumbildparoladon. Mi montris bildojn de Japanujo kaj rakontis pri miaj travivaĵoj en la lando de la leviĝanta suno. La geografifaka kolego poste pritraktis Japanujon. Ekzistis do bona preparo por mia unua Esperanto-leciono.

„Kiel mi orientis min lingve en Japanujo?“ Kiel instruiloj servis landkarto de Azio, originalaj bildoj japanaj kaj japana pupo.


En mia raporto al la registaro (Kultministerio) mi detale raportis pri la provo kaj la spertoj. Mi nur rezume klarigos la aferon.

Grandparte mi instruis laŭ direkta metodo, tiel ke ankaŭ infano sen kono de la germana lingvo sukcese povus partopreni la lecionojn. Nur la konstato de la gramatikaj kaj sintaksaj reguloj okazis tute germanlingve. Kompreneble mi diris ordonojn, kiel „Ripetu!“ — „Montru!“ — „Demandu!“ k.t.p. germanlingve. La demandojn kaj respondojn mi skribis sur murtabulon.

(Daŭrigota).

Striks, la Flameo. (Fino).

Bestoj ne estas pli bonaj ol homoj. Ankaŭ ili ofte turmentas mian onklon.



Sed kiu turmentas aliajn ulojn, turmentas sin mem.

Aŭskultu:

En kelkaj landoj la homoj kaptas „ŝtonstrigojn“. Ili ligas ilin per ŝnuro al arbobranĉo. La malgrandaj birdoj vidas tion kaj ekturmentadas. Sed la homoj ŝmiris gluon sur la branĉojn en la proksimeco de la ligitaj „ŝtonstrigoj“ kaj la birdoj kaptas sin mem.

Mi havas ankoraŭ multe da familianoj, sed nun mi reiros al miaj idoj en la turo de la Granda Preĝejo.

Sed unu rimarko: neniam forgesu, ke strigoj estas tre utilaj bestoj.

Ĝis revido, geknaboj, kie ajn!

El la Edama lerneja gazeto.

La unua printempa tago.

(ne-korektita verkaĵo de 13-jara knabino).

Birdoj komencas kanti dolĉe en la arboj, dum ili flugas ĉi tie kaj tie, serĉante muskon kaj ŝaflanon por moligi la neston. Arboj komencas elkreskigi siajn polurajn verdajn burĝonojn, por ke ili poste estu folioj.

Dum vi vagas laŭ la aleo, la dolĉaodoro de freŝa, juna herbo atingas viajn naztruojn. Galantoj puŝas sian vojon tra la riĉan malsekan teron. Jam krokus-burĝonoj intermiksiĝas inter la herbo, purpuraj kaj oraj. La primoloj ankoraŭ ne aperas, sed iliaj verdaj folioj kaj flavaj burĝonoj estas tie kaj tie apud riverbordoj.

Rozkoloraj burĝonoj de sovaĝaj ĉeriz-arboj, kratagoj kaj pom-arboj ekrigardas de inter la verdaj folioj.

La suno komencas subiri kaj la lastaj radioj brilas sur la gutoj de la vespera roso. La birdoj iras, al la hejmo por ripozi kaj mal-lumo falas sur la unuan printempan tagon.

Catherine Jackson, Bush Elms County Sec. School,
Romford, Essex, Britujo.

Enigmo pri objekto.

(La premiita verkaĵo de la konkurso en la januara
n-ro. — Korektita).

Ĉi tiu objekto povas esti diversa. Ĝi estas ankaŭ diversa en la somero kaj en la vintro kaj en la diversaj landoj. Sed mi skribas nur pri ĝi en nia lando Aŭstrujo.

Plej ofte plenkreskuloj bezonas ĝin, sed ankaŭ infanoj povas porti ĝin.

En la somero ĝi estas plej ofte farita el pajlo aŭ malpeza ŝtofo, sed en la vintro ĝi estas el dika felto.

La objekto transformiĝas laŭ modo, speciale ĉe la virinoj.

La objekto havas multajn kolorojn (sed, mi petas, ne unu!) ruĝa, blua, verda, flava (ne tre ofte), griza (tre ofte!) blanka, nigra, bruna.

Mi havas du tiajn objektojn. Mia patrino havas kvin kaj ankaŭ mia patro havas kvin. Mi portas ĝin nur dimanĉe. Estas tro multe-koste porti ilin ĉiutage.

Sed nun vi scias sufiĉe. Kio estas la objekto???

(Mi nomiĝas Ida Hager, Salzburg, Aŭstrujo. Mi estas 12½-j.
lernantino de la ĉeflernejo Griesgrasse en Salzburg.)

Ĉu vi jam varbis vian korespondant(in)on por „La Juna Vivo“?

La printempa ekskurso.

Sabaton, la 15-an de majo, ni ĉiuj kolektiĝis je la 8-a matene antaŭ nia lernejo. Estis belega vetero, neniu nuboj sur la ĉielo. Ĉiuj alvenis por partopreni en la printempa ekskurso. Ni tuj ekmarŝis kaj post unu horo ni atingis belan vilaĝon, kie ni faris mallongan halton por iom ripozi. Post kelka tempo ni deflankiĝis kaj supreniris la monteton, de kie ni povis admiri la vastan panoramon. Ĉi tie ni devis restadi du horojn por manĝi kaj ludi.

Ĉiu el ni elpakis el sia sako la provizojn kaj ekmanĝis kun granda apetito. Ĉar ni havis en niaj sakoj botelojn kun limonado, ni povis tuj trankviligi nian soifon. Poste ni ĉesis manĝi kaj iris ludi diversajn pilkludojn. Kelkaj el ni, kiuj estis pasiaj piedpilkludistoj, forkuris kun sia pilko sur la vastan herbejon, aliaj elektis aliajn pilkludojn kaj restis supre.

Post la 14-a horo nia instruisto kunvokis nin ĉiujn per fajfilo kaj kontrolis la nombron de ni. Feliĉe neniu forestis. Je la 17-a horo ni revenis hejmen, tre lacaj, kun sunbrunigitaj vizaĝoj, sed ege kontentaj.

Al la patrino mi alportis malgrandan bukedon de freŝaj kampfloroj, ĉar ŝi tre ŝatas ilin.

El „Kompleta Kurso de Esperanto” de prof. M. Sygnarski, Krakovo, Polujo.

Letero rakontas.

Hodiaŭ mi kaŝe aŭskultis la babiladon de letero kaj bildpoŝtkarto. Aŭdu pri tio:

„Dankon al Dio”, ĝemis letero el Stokholmo. „Dum tuta semajno mi vojaĝis.”

„Via vojaĝo ne estis tro longa! Pripensu, kiom pena kaj longa la vojaĝo estis antaŭ centoj da jaroj!”

„Pardonu, mi nur malmulte scias pri historio kaj mi ankoraŭ ne pripensis tion. Sed se vi konas la historion, rakontu pri tio. Ni nun havas sufiĉan **tempon**.”

Kaj la bildkarto komencis jene:

„La homoj estas tre scivolaj. Jam tre frue, ĉefe la regantoj volis kiom eble plej baldaŭ scii la novaĵojn en la regno. La plej aktiva, ĝis nun konata ekspresa servo ekzistis en la persa regno dum la regado de la reĝo Kirus, tio estas ses jarcentoj antaŭ Kristo: 559—529 a. K.

El la roma imperiestra tempo estas konata la „Cursus publicus”. Ĝi interligis Romon kun la provincoj. La urboj kaj la vilaĝoj apud

la stratoj, sur kiuj pasis la rajdantaj veturantaj senditoj, devis zorgi, ke tiuj vojoj estu en bona stato. Ofte tio estis peza ŝarĝo por la urbanoj kaj vilaĝanoj. Ĉi tiu aranĝo havis ĉefe militan celon.

La imperiestroj tiel ricevis ne nur sciigojn ekde la ŝtatlimoj, sed ankaŭ pri la novaĵoj (ofte ribeloj) en la ĉefurbo, sed ili venke akiris novajn landpartojn. Julio Cezaro ekzemple elsendis senditojn post egalaj intertempoj, por ke ili informu la loĝantaron pri liaj venkoj.

Kiam la araboj per la islamo konstruis mondregionon kaj venis en multajn regionojn apud la Mediteraneo, la kalifoj konstruis per pli ol mil stacioj bonan informservon.

Karlo la Granda sendis tra la regno senditojn, por ke ili donu sciigojn al la feŭduloj kaj por ke ili kontrolu la grafojn.

Dum la mezepoko la burĝaro konstruis jam kelkajn vojojn por la senditoj. En la fino de la 15-a jarcento estis en okcidenta Eŭropo jam kelkaj stratoj por la komerco kun regula senditservo. Speciale la komercistaj gentoj Fugger kaj la norditalaj urbaj respublikoj havis intereson por bonaj stratoj.

Ludoviko la XI-a de Francujo (1461—1483) transprenis la ideon de „cursus publicus”, kiam li konstruis la absolutan monarĥion kontraŭ la ribelantaj feŭduloj. Li aranĝis el centro gvidatan informservon kun polica rajto. Per tio li multe helpis al la unuigo de Francujo.

Ankaŭ la habsburga regno konstruis poŝton dum la mezepokaj bataloj pro la potenco. Ĉefe en la komenco de la 16-a jarcento la habsburganoj organizis bonajn informaranĝilojn.

Jam en 1504-a aranĝis Francisko de Taksis la sekvantajn poŝtliniojn:

a. de la kortego en Bruselo al Vieno. — b. de la nederlanda kortego al la kortego de Francujo. — c. de la brusela kortego al la kortego de la hispana regno.

Ĉi tiuj linioj servis nur al la imperiestra kortego kaj evoluis laŭ la pligrandiĝo de la imperiestra potenco. En 1516-a oni plilongigis la poŝtlinion ĝis Napoleono.

Ekde la jaro 1515-a la poŝto de Taksis transprenis ankaŭ sciigojn de privataj personoj.

Nova epoko komenciĝis, kiam Leopold de Taksis fariĝis Ĝeneralpoŝtmastro. La transporto de privataj leteroj nun estis profita komerco.

La evoluo de la kapitalista ekonomio kaj la teknikaj eltrovoj multe ŝanĝis la situacion dum la 19-a jarcento. Oni devis kompletigi la poŝton laŭ postuloj de la nova tempo. Ankaŭ la evoluo de la

fervojo influis la poŝton. En Anglujo oni en la jaro 1838-a jam aranĝis la unuan poŝtvagonon. Aŭstrujo sekvis en 1850-a. En la jaro 1839-a oni enkondukis la unuecan afrankon kaj jam en 1840-a sekvis la poŝtmarko.

En la jaro 1878-a la ĝenerala poŝtunuiĝo ŝanĝiĝis al mondpoŝtunuiĝo, kio ankoraŭ hodiaŭ garantias la rapidan transporton de leteroj kaj aliaj sendaĵoj al ĉiuj landoj de la mondo.

„Ankaŭ vi, kara kolego letero”, diris la bildkarto, „dankas vian rapidan vojaĝon al la mondpoŝtunuiĝo. Pro tio ne ĝemu, sed admiru nian grandan evoluon!”

„Jes”, respondis la letero. „Mi jam ne ĝemos. Mi dankas vin pro via interesa rakonto pri nia granda evoluo.”

Kaj fiera pri la granda historio de la poŝto ĝi manpremis la bildkarton.

Kaj nun, kara leganto, aŭdu kion viaj poŝtaĵoj raportas al vi kaj skribu aŭ desegnu pri tio!

Josef Steppan.

Penssporto.

La bordo de ŝipo troviĝas 10 metrojn super la nivelo de la maro. Ĉe la bordo pendas ŝnurŝtupetaro. La lasta ŝtupo pendas 33 centimetrojn super la akvo. Dum la alfluo la akvo plialtiĝas en unu horo unu metron. Post kiom da minutoj la akvo atingos la ŝtuparon?

La solvon vi trovos aliloke.

M. v. Waldowski, Berlin, Germ.).

KONKURSRUBRIKO.

Raportoj:

II. Bonan provon sendis Johnny Vlas, Hilversum, Nederlando. Malmulte da eraroj li faris kaj mi gratulas lin! Provu denove, Johnny, kaj ofte.

Ne forgesu skribi vian aĝon kaj instruisto aŭ parenco skribu, ke vi mem, senhelpe, faris ĝin.

N. H. Smith.

III. Ĉi tiun fojon mi ricevis pli da provoj kaj estas granda plezuro havi kelkajn el Aŭstrujo. Elekti la plej bonan estas tre malfacile, sed finfine mi donas la premion al Ida Hager en Salzburg, Gaswerkg. 22. Mi deziras gratuli ankaŭ Robert Fraser, Kirkcaldy (Brit.) kaj David Chiswell, Bodmin.

Novaj konkursoj:

II. (Ĝis dujara lernado): **Sekreta komunikilo.**

La alfabeto de Esperanto havas 28 literojn. Donu al ili la numerojn de: A = 1 ĝis Z = 28. Se vi povos legi mian komunikilon, vi certe povos fari tion, kion ĝi postulas!

22 6 18 5 25 / 1 16 / 17 12 / 22 6 15 21 6 24 1
 18 / 7 21 1 28 19 18. // 15 1 13 / 17 12 / 21 6 22
 20 19 18 5 19 22 / 1.16 / 27 12 ///

Sendu vian provon antaŭ la 10-a de julio al: s-ro H. Smith, Grange Farm, Upper Halliford, Shepperton, Anglujo.

III. (por ĉiuj lernejoj): „Priskribu vian hejmurbon por eksterlandano, kiu intencas viziti vin.”

Provojn devas atingi min antaŭ la 10-a de aŭgusto.


Konkursreguloj: Skribu klare: 1. vian nomon; 2. vian naskiĝdaton; 3. dum kiom da tempo vi studis esperanton; 4. la nomon aŭ specon de via lernejo; 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

Premioj por Konkursoj: Britoj povas ion elekti el la katalogo de la Brita Esperanto-Asocio ĝis la valoro de 2 ŝ. 6 p. por Konkurso I; ĝis la valoro de 3 ŝ. por Konkursoj II kaj III. Adreso: 140, Holland Park Avenue, London W II. En aliaj landoj la premio-gajnintoj devas elekti unu libron el jena listo:

Konkurso I: „Esperanto por Infanoj” (Salomon), legolibro, aŭ „Komuna Kantlibro” (Holmes) kantoj kun muziko aŭ: „A.B.C. Libro”, rimajoj kaj bildoj.
 Konkurso II: „Tejo kaj Ĉerik” (Toms), historietoj, aŭ „Johano kaj Silvio” (Betts) legolibro kun angla vortaro aŭ „Neĝulino” (Grimm) aŭ libro el Konkurso I-listo.

Konkurso III: „Kudlago, la malgranda Eskimo” (v. Hichtum), aŭ „Pinokjo” (Collodi) aŭ „La Nova Testamento” aŭ libro el la listoj por I kaj II.

Kiam vi scias, ke vi gajnis premion, skribu tuj al la Brita Esperanto-Asocio kaj sciigu tion. Elektu la libron, kiun vi preferas.



7-a Internacia
 Junular-Kunveno
 en Haarlem, Nederlando
 (26/7—2/8 1951)

Adr. Organiza Komitato:
 M. Tinxgracht 10, Edam,
 Nederlando.

La tempo rapide pasas kaj nia harlema kongreso alproksimiĝas. Gepartoprenontoj el 11 landoj anoncis sin. Sed — bedaŭrinde kelkaj anoncis sin kaj ĝis nun forgesis sendi siajn aliĝilojn. Tio estas grava malfacilaĵo por ni kaj ni avertas, ke post la 1-a de julio ni ne plu povos akcepti aliĝilojn!

Jaŭdon, la 26-an de aŭgusto alvenos la ge-partoprenontoj kaj

jam la 27-an de aŭg. ni faros tre belan ekskurson. Do, ne venu tro malfrue!

Ĝis nun anoncis sin 250 personoj kaj ni povos disponi pri 260 lokoj. Nepre ne pli.

La lernejoj, en kiuj ni loĝos estas belegaj: bonaj litoj, konversaciejoj, skribejoj kaj eĉ ĉambro por malsanuloj.

La vesperaj programoj promesas fariĝi tre interesaj. Unu el niaj jugoslavaj amikoj kunportos belan filmon pri sia lando. Diversaj grupoj jam promesis prezenti teatraĵeton k.t.p. Kaj kun granda plezuro ni povas komuniki, ke du eminentaj ge-samideanoj deklaris sin pretaj prelegi dum unu el niaj vesperoj: s-ino **J. Isbrücker** el Hago (Ned.) faros mallongan paroladon pri mondfederalismo kaj s-ro **Andreo Cseh** oratoros pri „Miaj spertoj kiel propagandisto por Esperanto”. Jen do unika okazo aŭskulti du famajn Esperantistojn!

Nia kongreso estu granda sukceso por T.J.O.!

Ĝis en Haarlem!

Tria listo de partoprenantoj: **El Britujo:** 103. Jacqueline Beasley (London), 140. A. Libby (London), 141. E. J. M. Franklin, 142. B. J. Boon, 143. D. S. J. Monument, 144. A. E. Martin, 145. R. Miles, 146. B. R. Warren, 147. H. Toms (ĉiuj el Dagenham), 149. F. E. Shortland (Ipswich), 152. M. Field (Birmingham), 153. P. Price (Birmingham). **El Francujo:** 104. Lucien Giloteaux (Croix), 114. M. Jacotin (Reims), 109. E. Bidoit (Suippes), 108. L. Bidoit (Suippes), 133. M. Jennequin (Avion), 136. B. Rosenzweig (Nancy), 137. J. C. Ferret (Paris), 139. J. Fabert (Gaillas), 150. M. George, 151. R. Correy (ambaŭ en Besançon), 158. M. Fabert (Gaillas). **El Ĉeĥoslovakujo:** 125. Oldrich Antos (Deĉin). **El Germanujo:** 105. Günter Bartz (Dortmund), 102. Heinrich Mees (Wattenscheid), 116. Robert Klammer, 117. Karl Menzel, 118. Gundel Bierer, 107. Ruth Bohl, 106. Otto Bohl (ĉiuj en Bremen), 115. J. Knittel (Seltz), 138. G. J. Brinkmann (Herford), 148. W. Dickel (Wellinghofen), 155. L. Waldowski (Berlin). **El Jugoslavujo:** 131. Drago Kralj, 132. Davorin Bazec (ambaŭ el Ljubljana), 154. L. Takac, 157. J. Slat (ambaŭ el Zagreb). **El Nederlando:** 110. B. v. Moorst (Bussum), 111. Th. Knegt (West-Grafdijk), 112. W. H. Koopmans, 113. Johnny Vlas, 134. H. Oudenaller, 135. M. v. d. Berg (ĉiuj el Hilversum), 120. A. C. Teunissen, 121. A. Teunissen, 122. B. Kroeze, 123. H. Stoffels, 119. W. H. Graas (ĉiuj el Hengelo), 127. S. S. de Jong Dzn. (Tjerkwerd), 128. E. de Langen, 128. S. E. Veldhuyzen, 130. Ed. J. Veldhuyzen (ĉiuj el Delft).

Dua listo de donacoj: S. S. de J. Dzn. en Tjerkwerd (Ned.): 1.— guld.; M. G. en Besançon (Franc.): 750 fr.fr.; W. D. en Wellinghofen (Germ.): 10 DM; H. T. en Dagenham (Brit.): 5.— guld.; J. F. en Gailles: 100 fr.fr.; M. F. en Gailles: 200 fr.fr.; B. R. en Nancy: 500 fr.fr. (ĉiuj en Francujo), B. v. M. en Bussum Ned.): 5.— guld.

Ni multe dankas al ĉiuj donacintoj. Sed — ho ve! Por helpi la malriĉajn kandidatojn al nia 7-a IJK, ni bezonas multe pli! Kiuj helpos????

Nia postkunveno en Hollandsche Rading:

Anoncis sin 103 personoj.

Ĉiuj restos en Haarlem ĝis sabato, ĉar nur tiam ni povos eniri la kampdomon „De Rading”. De jaŭdo ĝis sabato ni do restos en unu el la lernejoj en Haarlem kaj la tiea grupo zorgos pri interesa programo. Verŝajne ni sabate per aŭtobusoj iros al „De Rading”. Bedaŭrinde en la kampdomo ne estas kovriloj, do ĉiu mem kunportu tiujn. Plue oni tien kunportu: tason aŭ kalikon, teleron, forkon, kuleron kaj tranĉilon. Por la eksterlandanoj tio certe estas iom malfacila, sed vere necesas, ĉar la kampdomo estas nur tre simpla. Tamen — la ĉirkaŭaĵoj estas tre belaj, do ni certe multe ĝuos!

Aŭtobusa karavano al Haarlem. — 30 kongresaj ge-partoprenontoj vojaĝos de Manĉestro (Anglujo) al Haarlem per propra aŭtobuso kaj ŝatus dumvoje renkonti gesamideanojn. La karavano pasos London, Dover, Dunkerque, Ostende, Gent, Antverpeno, Tilburg, Utrecht, Amsterdam. Restas 4 liberaj sidlokoj, por anglaj, francaj aŭ belgaj gekongresanoj. — Ni estas pretaj inviti junan samidean(in)on, spertan esperantist(in)on, kiu jam aliĝis al la 7-a IJK, viziti nian urbon kaj resti ĉi tie senpage dum la semajno antaŭ la kongreso kaj veturi kun ni en la aŭtobuso de Denton al Haarlem. Ni volos pagi la vojaĝon de Calais ĝis Denton kaj aranĝi renkonton ĉe Dover, k.t.p. Skribu al S-ro Williams, County Sec. School, Denton M/C, Anglujo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando*).

T.J.O. akceptita en landa junulara parlamento en Germanujo.

En sia 3-a plenkunveno, je la 21-a kaj 22-a de aprilo, la junulara parlamento (Landesjugendring) Baden akceptis unuanime, ĉe 3 sindetenoj de la protestanta junularo, la Regionan Ligon Baden de la germana sekcio, kiu, kiel „Esperanto-Junularo”, petis antaŭ kvarona jaro pri akceptiĝo.

Tiu bonega rezultato estiĝis ĉefe pro tio, ke oni sciis de la Esp.-junularo de la 6-a IJK en Konstanz pasintjare, kiu ja vekis grandan eĥon.

Ekde nun la Esp. junularo kunlaboros en la 3 sekcioj de la LJR: kulturpolitika (kie oni i.a. diskutas pri la lerneja reformo), socialpolitika kaj radio-sekcio.

Krome, ĝi ĝuos la jenajn avantaĝojn: 1. Monsubvencion de ĉk. 700 DM. jare. 2. Konsento de 50 %-a fervoja rabato por regionaj kunvenoj, renkontiĝoj k.t.p. 3. Ebleco de kontaktigo de la aliaj junularorganizoj pro disvastigo de nia idealo.

Grave estas, ke oni akcentu ne la disvastigon de Esperanto,



sed la ĝeneralan kulturan laboron ĉe la formigo de personecaj valoroj.

M. Schmidt.

Refoje ni petas, ke oni sendu proponojn, raportojn kaj diskutotemojn al la sekretariino antaŭ la 1-a de julio 1951-a.

Elkore ni gratulas ges-rojn Cullus, 13 rue Chopin, Anderlecht-Bruxelles, al kiuj naskiĝis filineto: Denise.

SKOLTA RUBRIKO.



Ĉeĥoslovakujo: Oni starigis novan klubon de esperantistaj ĝeskoltoj en Prago. Oni kunvenas preskaŭ ĉiun tagon.

Danujo: La danaj esperantistaj geskoltoj ĵus eldonis propagandilon enhavantan bildojn de d-ro Zamenhof kaj Baden Powell. Tiu propagandilo estas sendita al ĉiuj estroj de la dana skoltismo.

Ĝi estas presita kaj aspektas tre bela. Ni gratulas niajn danajn fratojn pro ilia bona laboro favore al Esperanto.

Ambaŭ danaj virskoltaj asocioj aprobis insignon por Esperanto-tradukisto, sed la virinaj ankoraŭ ne.

En **Francujo** la skoltoj povas akiri la komunan insignon de tradukistoj se ili bone parolas kaj skribas Esperanton.

Jamboreo. — D-ro Halbedl, agento de la Skolta Esperantista Ligo en Aŭstrujo, atentigas skoltojn kaj skoltamikojn, ke nunjare okazos la jamboreo apud Bad Ischl, konata banloko. Oni petas, ke skoltoj sin turnu al la skoltestroj en ĉiuj landoj por atentigi pri Esperanto.

Utilajn informojn oni povas ricevi de la organiza komitato:

Pfadfinder Österreichs, Schloss Schönbrunn, Westtrakt, Wien XIII.

Zigzaganta Hipopotamo.

POSTMARKRUBRIKO.

Kiel vi jam vidis, ni devis forsendi multe da leteroj kun aliaj p.m. ol vi petis. Ni ne ĉiam posedas la petitajn p.m. kaj ankaŭ ne ŝatas atendigi vin tro longe. Ni esperas, ke vi tamen estos kontentaj.

Ni urĝe petas ĉiujn legantojn de LJV sendi al ni poŝtmarkojn. por ke ni helpu niajn geamikojn.

Ĉi tiun monaton ni ricevis kaj hodiaŭ respondis la sekvantajn

leterojn: Amiko G. O. Crawley, 35 anglajn p.m. Li deziris svisajn. Ni esperas trovi ilin por vi.

George Stumpfegger: 200 diversajn. Ĉu vi jam ricevis niajn?
Donacojn de Günther Schaedel.
Belajn poŝtmarkojn de amiko A. Podrepschek el Aŭstrujo.
Kiu sekvos???

Afabla peto: Poŝtmarkojn oni bonvolu sendi rekte al la Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando, kaj ne al T.J.O.-Centro! Tio kaŭzas duoblajn kostojn kaj laboron.

Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edam.

La solvo de la pensporto: Neniam, ĉar dum la alfluo je ankaŭ la ŝipo plialtiĝas. Do la diferenco ĉiam restas sama.

GENERALAJ INFORMOJ.

Svisujo — Berneroblerland. — Pro malsaneco de unu el la partoprenontoj en nia bela vojaĝo per luksa aŭtobuso Amsterdam—Berner Oberlando (3-15/8) du gejunuloj povos havi belegan ferion ĉe la piedo de la „Jungfrau”. Kostoj: f 116.—, ĉio enkalkulita. C. Geurts, M. Tinxgracht 10, Edam.

Turista Servo Esperantista por Okcident-Eŭropo rezervas malmultekoste hotelĉambron, prizorgas gvidadon, turistajn prospektojn (1 resp. kup) Robert Loecks, Konijnenperken 109, Brussel, Belgujo.

Prospekto pri München. La urbo München eldonas esperantlingvan prospekton. Postulu jam nun tiun senpagan prospekton al: Städt. Verkehrsamt, München, Sonnenstr. 24.

Germana gazeto pri junulargastejoj ŝatas ricevi raportojn de eksterlandaj junuloj pri migrado en Germanujo kaj pri vizito al germanaj junulargastejoj, ankaŭ pri migradoj en la eksterlando. Sendu la raportojn al Esperanto-Centro, Engelbertstr. 7, München-Pasing, Germanujo.

Ĝustigo: La libertempa kolonio internacia, kiu okazos inter 17/7 kaj 4/8 (vidu LJV de aprilo) ne estos GEE-a, kiel erare anoncite. Ĝi koncernas nur junulojn 15-19-j.). Petu informojn de f-iĝo J. Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse, Francujo.

UEA-Kongreso en München: Kiu deziras manĝi kaj loĝi modeste, povos por 24,50 G.M. dum unu tuta semajno ĝui la vivon en Esperantujo (kondiĉe ke li (ŝi) pagas la kongresan kotizon). Skribu al la Loka Kongresa Komitato, Engelbertstr. 7, (13b) München, Germanujo.

Alvoko: Ĉiuj esp. organizaĵoj kaj unuopuloj sciigu la adresojn de sialandaj parlamentanoj esperantistaj, por ke ni havu superrigardon en kiuj landoj estas parlamentanoj esperantistajn. Respondojn sendu al Dietrich Keuning, parlamentano Deutscher Bundestag, Bonn, Germanujo.

Brugge, la artjuvelo de Belgujo. Ilustrita faldproskto. Adr. Urba Servo por Turismo, Dijver 16, Brugge, Belgujo.

Mendu viajn esperantajjn ĉe la TJO-Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando.

KORRESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Britujo: 100 gelernantoj kaj gejunuloj, ĉiuj komencantoj, dez. kor. k. l. t. m. Skribu unue al: S-ro Williams, County Sec. School, Denton, Manchester.

Bulgarujo: Stephan Dimitrov, str. Moskva 6 z, Burgas, dez. interŝ. poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

Gimnaziano dez. kor., interŝ. poŝtk., bildk., gazetojn. Dinko K. Pavloff, ul. Car Samuil 6i, Burgas.

Todor G. Kanev, str. „Car Troian” 94, Burgas, dez. kor. k. l. t. m., interŝ. poŝtmarkojn, poŝtk., bildkartojn, gazetojn ktp.

Ganĉo Georgiev Ĥristov, str. Bitolja 23, Burgas, dez. kor. k. l. t. m.

Tonĉo Mavroff, str. Aleks Veliky 27, Burgas, dez. kor.

Marin W. Koev, str. Ĉumerna 6, Kazanlik, dez. interŝ. neuzitajn p. m. en kompletaj serioj, laŭ la katalogo „Ivert” 1951.

Ĉeĥoslovakujo: Jao Kubat, Ostrava 1, Nadrazni 9, dez. kor. kaj interŝ. kun filatelistoj kaj fotoamatoroj.

La Esperantista klubo en Lanškroun dez. interŝ. mapojn, bildojn, bildk., gazetojn, librojn, ktp. Ĉiuj anoj dez. kor. Respondo garantiata.

Finnlando: Sendu 50 poŝtmarkojn kaj leteron, mi respondos same. S-ro Jussi Sive, Sara.

Francujo: 24-j. f-ino dez. kor. kun Norvegujo, Svedujo. Ĉinujo. Interŝ. bildkartojn. Alyce Chapelle, „Les Bruns”, Suze-la-Rousse (Drôme).

S-ro Bouême Gerard, 9 bis rue Montbouron, Versailles (S et O), dez. kor. kun eksterlandanoj. (korekto de la adr. en la marta n-ro).

15-j. knabo, aliĝinta al la libertempa kolonio en Francujo, dez. kor. kun aliaj p. p. Bernard Ciret, 4 Place Gregoire de Tours, Tours, i. L.

9-jara esperantistino dez. interŝ. il. poŝtk. kun infanoj en ĉiuj landoj. Noëlle Angeard, St. Saturnin, par Brissac (M et L).

Germanujo: 18-jara Esperantisto dez. kor. kun gejunuloj en ĉiuj landoj. Klaus Ahlsdorf, Bünde (Westf.), Hindenburgstr. 17.

Italujo: S-ro Remigo Novak, Trieste (210), v. Pascali 23, interŝ. poŝtm. uzitajn (ne-nederlandajn). Por 30 ekz. mi sendas saman kvanton.

Nederlandujo: Fruktkulturisto dez. kor. kun frukt- aŭ terkulturisto en Novze-lando. Skribu al A. Blauw (19-j.), Cattenhagestr. 45, Naarden.

La Junular-amuzklubo „Ekstazo” organizos letervesperon fine de junio. Skribu multnombre. Resp. garantiata. Lombokstr. 2, Leeuwarden.

Nia belaspekta glumarko bonege propagandas la 7-an I.J.K.n en Haarlem. Ĉu vi jam mendis kvanton? Se ne, rapidu!!! 12 ekzempleroj por 1 respondokupono (aŭ 20 cendoj). Mendu al la libro-servo: M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando, aŭ al T.J.O.-Centro.

Ni havas ankaŭ tre fortikajn **insignojn** (kun ŝraŭbo). Prezo 0,75 guld. plus afranko. — La **binditaj jarkolektoj** de La Juna Vivo ('34/'35, '35/'36 kaj '36/'37) enhavas taŭgan legaĵon por ĉiu Esperantisto. Ampleksa libro, **prezo nur 1.— guld. plus afranko.** Mendu nun!